



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

ENHAVO :

La Flandra Leono. — La Izermemormomumento de Flandrujo. — Gratuloj. — La Lingva Evoluado. — La Flandroj kaj la Esperantista Lingva Komitato. — Katalunoj ! — La Flandroj ĉe la Internacia Blindulkongreso en Vieno. — Antverpeno en la XVIa. kaj XVIIa. jarcento. — La lastaj Balotelektadoj en Flandrujo. — Inter ni. — Novaĵo el Katalonujo. — Esperanto door zelfonderricht. 1° Les. — Bibliografio. — Subteno por nia revuo.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto-Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

LA FLANDRA LEONO (*)

Teksto de H. VAN PEENE.

Muziko de K. MIRY.

Neniam kvietigos
Leonon flandran vi;
Li ĝuos liberecon
Nenion helpos kri'.
Neniam kvietigos,
Dum vivos ni, leon',
Dum havas li ungegojn
Kaj dentojn, laŭ bezon'.

Rekantajo.

Neniam kvietigos,
Dum vivos ni, leon',
Dum havas li ungegojn
Kaj dentojn, laŭ bezon'.

La temp' forglutas urbojn
Kaj falas iam tron',
Sed ne pereos nia
Popolo kun leon'.
Almarŝas malamikoj,
Minacas mort-furi',
Ni ridas pri danĝeroj,
Leono apud ni.

Batalas li jarmilon
Por flandra kara sort',
Kaj restis li potenca
Kaj en juneca fort'.
Pensante, ke li svenis
Aliras vi kun mok',
Minace kaj terure
Leviĝas li el lok'.

Kaj se intencas oni
Per fals', perfid' en fin'
Surprize lin ataki,
Malliberigi lin,
Atentas li pri ĉiu
Suspekta via gest',
Hirtigas kolhararon
Kaj muĝas reĝa best'.


Sufiĉe da incitoj!
Jen venĝos potencul' :
Al malamik' li saltas
Kun fajro en okul'.
Dissiras li kaj rompas
En la batal-furi';
De sango makulite,
Triumfe muĝas li.

(Tradukis Antoni Grabowski.)

(*) La muziko de ĉi tiu belega kanto, la nacia kanto de la Flandroj, kun speciala fortepiana akompanado de **Jef Van Hoof**, estas havebla ĉe FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen, poŝtĉeko 2427.03, po 1 belgo.

La Izer-memormomumento de Flandrujo.

Militmomumento, kiu iĝos la plej granda de la tuta lando, sed antaŭ kiu neniu oficialulo kuraĝos montri sin, sur kiu neniam flirtos la ŝtata flago kaj antaŭ kiu neniam eksonos la oficiala nacia kanto, jen strangaĵo en lando kiel Belgujo, kie militmomumentoj estas starigataj en ĉiu vilaĝo kiel gardantaj anĝeloj de la ŝovinismo.



La Flandra Izermemormomumento starigata en Diksmude.

Tia militmomumento estas la Izer-memormomumento de Flandrujo. Ĝi iĝos alta je 50 metroj, konstruata per la riĉa amo kaj la humilaj mondonacoj (*) de la Flandroj mem ; kaj ĝi staros tie alta kaj tragika kaj... kulpiga.

(*) Mondonacojn oni sendu al la sekretario-kasisto de la „Werk der Jaarlijksche Bedevaart naar de Graven van den Yzer” : Cl. de Lantsheer, Wilfordkaai, Temsche. Postcheck 113.465.

La Belga militistaro konsistis po 80 % el Flandroj, komanditaj fremdlingve kaj punitaj pro malgravaĵoj per teruraj punoj ; post ilia puntempo ili ricevis okazon... rehonorigi sin per sia sango. Tiel 30.000 Flandraj knabegoj estis enterigitaj en la koto de l'Izero.

Por havigi al la Flandraj militmortintoj tomoŝtonon, indan je ilia kuraĝo kaj memofero kaj ilia gento, komitato „Heldenhulde” („Herohonoro”) estis fondata la 15^{an} de Aŭgusto 1916 ĉe l'Izerfronto.

La fama flandra pentristo *Joe English* estis projektinta la konstruotajn tomoŝtonojn laŭ Ira modelo ; ili estus ĉiuj samformaj : simplaj kaj belaj, supre la kruco kun la flandra devizo : „**Alles voor Vlaanderen, Vlaanderen voor Kristus**” (A. V. V. - V. V. K.), t. e. „**Ĉio por Flandrujo, Flandrujo por Kristo**” ; malsupre blupieda mevo, simbolo de la flandra idealo.

Ĉi tiu ideala bonfara agado, plejparte subtenata per la ŝparmono de la flandraj soldatoj mem, floradis kaj baldaŭ la nombro de tomoŝtonoj kreskis ĝis mil.

Sed ju pli ili multiĝis, despli ili enviigis tiujn, kiuj — sin embuski-gintaj en unu aŭ alia oficejo malantaŭ la fronto — ne povis militmorti. Oni timis la forton kaj ateston de tiuj krucoj kaj sekrete oni konspiris kontraŭ ili.

Tiel, dum la nokto de la 9^a - 10^a de Februaro 1918 nekonitaj tombatencantoj forviŝis per cemento la testamentajn leterojn A. V. V. - V. V. K. de 36 krucoj de la tombejo de Oeren. Dudekkvar horojn poste tamen okazis spontanee la rehonorigo de la atentitaj tomboj. La 11^{an} de Februaro grupo da simplaj infanteristoj iris al Oeren kaj pentris la leterojn duoble grandaj sur la tomboj !

Tio estis ankoraŭ dum la milito ! Post la milito la malamo kontraŭ la tomoŝtonoj de „Herohonoro” iĝis ankoraŭ pli granda: embuskiĝintoj kaj militprofitintoj unuiĝis kontraŭ la nova spirito, kiu animis la flandrajn militintojn. Sekrete oni intrigis kaj fine la Belga registaro, pretekstante ke ĝi volis doni al la militaj tombejoj saman aspekton, decidis la forigon de neoficialaj tomoŝtonoj kaj ilia anstataŭigo per „unuformaj” tomoŝtonoj. La uniformo ĝis en la morto !

La kortuŝo kaj kolero estis granda je l'ekscio de ĉi tio en tuta Flandrujo. En 1924 oni decidis savi malgraŭ ĉio la minacitajn tomoŝtonojn : kunigi kaj reerkti ilin sur propra flandra tombejo sur aĉetota tereno apud Dixmude. Sed antaŭ kiam oni povis realigi tiun planon, la registaro malice malebligis ĝin.

Laŭ ordono de la ministro de Landdefendo 730 tomoŝtonoj de „Herohonoro” estis je l'fino de Majo 1925 elterigitaj kaj detruitaj por... plibonigi per ili makadamvojojn ! La plej sankta, kio restis de l'milito

al la Flandroj, estis laŭ registara ordono piedpremata kaj senhonorigata. Ne nur la militintoj, kiuj starigis la tomboŝtonojn, sed la tuta vivanta Flandrujo, kiu kun danko ricevis kaj volis gardi ilin por la posteularo!



Makadamvojo de Adinkerke farita per la detruitaj tomboŝtonoj.

estis ofendita per tio. Ĉu sama kruda atenco de militintomboj estas imagebla en alia lando?

Estas kompreneble, ke nun la kolero estis ĝenerala. Ne nur la flandra gazetaro moviĝis, sed la afero estis ankaŭ preparolata en la Parlamento kaj multaj deligitaroj iris al la priresponda ministro. Post longaj kaj malfacilaj intertraktoj, oni povis ankoraŭ savi kelkajn tomboŝtonojn.

„Herohonoro” cedis siajn rajtojn al la „Flandra Pilgrimadkomitato”, kiu estis aĉetinta en 1924 terenon por la kunigo kaj savo de la ĉie sed nenie sendanĝere starantaj tomboŝtonoj.

En 1925 Flandrujo donis klaran respondon al la oficiala tombatenado! Sur la aĉetita tereno kunvenis pli ol 30.000 pilgrimantoj kaj kiel reprezentantoj de la 30.000 mortintoj ili solene kaj unuamime ĵuris la ĵuron de fideleco al Flandrujo! Je tiu neforgesebla momento estis inaŭgurata provizoran momumenton, samforman kiel la tomboŝtonoj, kun la subskribo:

„HIER LIGGEN HUN LIJKEN ALS ZADEN IN 'T ZAND :
HOOP OP DEN OOGST, O VLAANDERLAND”.

(Ĉi tie kuŝas iliaj kadavroj kiel semeroj en la tero :
Amasigu la rikolton, ho Flandrolando”).

Samtempe oni decidis la erekton de 50 metrojn alta Flandra Izer-

memormomumento laŭ la premiita projekto de l'fratoj Van Averbekel el Antverpeno.

En 1926, je l'enterigo de l'unua fosto, kunvenis 60.000 Flandroj; en 1927 pli ol 80.000 kaj en 1928 pli ol 100.000 kun miloj da flagoj, inter kiuj ne unu belga trikolora, kun centoj da muzikistaroj, el kiuj ne unu ludis la „Brabançonne”, la belgan nacian kanton.

En oficialaj rondoj oni ekkomprenas la danĝeron. La franclingva gazetaro silentas. Sed oni mem tion volis! Kiu semas venton, ventegon rikoltos!

Ĉi tiun jaron certe pli ol 100.000 Flandroj pilgrimos al la Izerbatal-kampo por memori siajn mortintojn, kiuj oferis sian sangon esperante dankemon kaj rerajtigon de ŝtato kaj de reĝo, kiu ja promesis egalecon rajte kaj fakte al la Flandroj, sed ĝis nun ne plenumis sian promeson.



Sesa Pilgrimado (Diksmude 1925)

La ĵuro de fideleco al Flandrujo.

Okazos ĉi tiun jaron ankaŭ dum la X^a. Pilgrimado internacia honordemonstracio: francaj, germanaj, anglaj, amerikanaj militintoj metos kronon ĉe l'piedo de la momumento. Kaj ankaŭ la flandremaj esperantistoj partoprenos tiun pilgrimadon kun sia flago kun la verda stelo kaj ĉerpos tie en la Izerkamparo novajn fortojn por sia batalado kontraŭ la milito kaj kontraŭ ŝtato, kiu senutile verŝigis tiom da flandra sango.

GRATULOJ.

— Al nia samideano Jozef Van den Eynde, membro de Flandrema Grupo Esperantista, kiu edziĝis la 9an de Julio kun Maria Van der Linden.

— Al sinjoro Maur. Jaumotte, prezidanto de „La Verda Stelo”, kaj lia ĉarma edzino pro la naskiĝo de fileto Roger.

La Lingva Evoluado (*)

Pardonu, karaj legantoj, se en ĉi tiu ne prilingva gazeto *Oomoto Internacia* mi — prezidanto de la Lingva Komitato — esploros antaŭ vi prilingvan demandon : la kondiĉojn de lingva evoluado. Mi esperas, ke vi tiom pli facile pardonos, ĉar mia deziro estas vin konvinki, ke la gazetoj, kiuj plej efike helpas al la vivo kaj evoluado de nia lingvo estas : *Oomoto Internacia*, *Espero Katolika*, *Sennaciulo*, *La Fakaj Revuoj*, ekzemple, kies celo estas la propagando ne de la lingvo mem, sed de ideoj, de definitiva programo, ĉu religia, ĉu politika, ĉu socia, ĉu scienca. Por tiaj gazetoj la internacia lingvo estas ilo, *nur* ilo, kaj tio estas bona.

Tro ofte en niaj esperantaj gazetoj la ĉefa afero estas la lingvo „en si mem”, „por si mem”. Ni ne riproĉu tro insiste kaj male konstati kun danko, ke nepre necesaj en la nuna periodo — la plimulto el ili penas por liveri al siaj abonintoj interesan legaĵon. Sed, propagandiloj antaŭ ĉio, neŭtraluloj, mankas al ili ia firma ideo programo, ia nelingva doktrino, kiun ili vigle, energie eĉ pasie defendus, uzante la lingvon simile kiel esprimilon de iu idealo, kiu instigas al forta, daŭra agado.

Zamenhof kreis Esperanton ne kiel senaniman gramatikan kaj vortaran sistemon, sed kiel lingvon *v.vantan*, dank'al tio, ke la lingvo por li estis nur la bezonata esprimo de ia profunda pasio : lia amo al homaro. Tie kuŝas la forto, la supereco de Esperanto, kompare kun la aliaj artefaritaj lingvoj, fakte nur senanimaj, senvivaj lingvaj sistemoj, ludiloj, kiuj povas momente plaĉi al kelkaj lingvistoj, lingvoamantoj, kies ĉefa zorgo cetere estas ilin ame ripari, reformi, anstataŭ utiligi. Vivpova estis Esperanto tuj je sia naskiĝo kaj viva ĝi restis, ĉar oni ĝin tuj uzis, ne por la simpla plezuro ĝin uzi, sed por ia ĉu pli praktika, ĉu pli alta celo.

Ni venu nun al nia speciala temo : la lingva evoluado.

Tute prave Zamenhof skribis ke „Volapük” pereis pro unu grava eraro : absoluta manko de natura evoluipovo (Antverpeno 1911). Sed nur *vivanta* lingvo povas *nature* evolui kaj lingvo vivas nur per la uzado. Sekve la unuaj esperantaj pioniroj, kiuj tuj uzis la lingvon anstataŭ ĝin kritiki kaj perdi sian tempon en vanaj diskutoj, agis tute saĝe, racie, *vere science* ! Lingvo ne evoluas per decidoj, per dekretoj de kelkaj teoriistoj, gramatikistoj, vortaristoj ; reformojn, pli malpli kontentigajn tuj ĉi povas proponi, sed tute alia estas lingva evoluado.

(*) En „*Oomoto Internacia*”, la monata organo de la „*Universala Homama Asocio*”, ni trovis en la *Julia* numero ĉi tiun ĉefartikolon de la mano de nia ŝatata prezidanto de la Lingva Komitato,

La evoluado, kiu estas kontinueco en la movado, postulas *unue* ; ian firman bazon, kiu, en niaj naciaj lingvoj, estas la tradicio, en Esperanto — nia Fundamento ; ĝi postulas *due* — kaj tiel grava estas la dua kondiĉo kiel la unua — ne nur la vivopovon de la lingvo, sed ĝian veran, efektivan daŭran vivon ; tio signifas ĝian plenan uzadon, ĝian sufiĉe ĝeneralan uzadon buŝe kaj skribe. La fonte de la vivo, aŭ pli ĝuste la vivo mem de la lingvo, estas ĉi tiu buŝa kaj skriba uzado, per kiu ni esprimas ĉiujn movojn de l'spirito, de l'animo, de l'koro. Por tia esprimo ni ofte bezonas novajn vortojn, novajn parolturnojn. La bezono naskas la lingvan ilaron. Tiel pliriĉiĝas la lingvo, tiel ĝin modifas, per praktiko kaj ne pro teoriaj motivoj, la uzantoj. El tiu pliriĉiĝo, el tiuj modifoj konsistas la evoluo.

Ne estu tro severaj, karaj legantoj, se tiujn ideojn mi prezentas intermiksante ilin, laŭ la kaprica movado de la pensa fluo, sed mia konkludo estos, mi esperas, tute klara por ĉiuj.

1^e *Vivpova estas nur lingvo, kiun naskas forta sento.*

Tiun kondiĉon plenumas Esperanto kaj inter artaj lingvoj *nur* Esperanto.

2^e *Persisto en la vivo estas ebla por lingvo nur dank'al evoluipovo. Aliparte, evoluo bezonas krom firma bazo, ĝeneralan uzadon, kiu estas la viva faktoro de l'evoluado.*

Tiun kondiĉon plenumas Esperanto kaj inter artaj lingvoj *nur* Esperanto.

Uzi lingvon, ne por ĝin uzi, sed vere, efektive kiel ilon por traduki, komuniki homan penson, homajn bezonojn, homan idealon, tion vi faras, inter aliaj, *Oomoto Internacia* kaj tiel plej efike servas al la vivo de Esperanto, al ĝia evoluado.

Kun danko, sekve, kaj kun plezuro mi akceptis la afablan inviton de S-ro Niŝimura, verki por lia gazeto la ĉi supran artikolon pri la kondiĉoj de lingvaj vivo kaj evoluo.

TH. CART.

La Flandroj kaj la Esperantista Lingva Komitato.

La *Esperantista Lingva Komitato* konsistas el lingvaj kompetentuloj kies nombro ne estas limigita. La anoj de la L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por 9 jaroj laŭ listo starigata de la Akademio. Rajtas prezenti kandidatojn la Naciaj Societoj, U. E. A. kaj la Fakaj Societoj. Nuntempe la L. K. konsistas el 110 anoj. Laŭ la lingvo partoprenas la diversaj popoloj kaj la Flandra estas reprezentata per la 2 jenaj :

D-ro van Melckebeke, Avenue de France, 22, Antwerpen.

Witteryck, A. J., 136, Grande Avenue, Steenbrugge (Bruges).

Ĉu tiuj reprezentantoj de la Flandra popolo bonvolus flandrigi sian adreson en la oficiala listo de Lingva Komitatoj ?

KATALUNOJ!

Katalunoj, kies lingvo
en la ora mezepok'
el la buŝ' de l'trobadoroj
sonis ja en ĉiu lok'; —
kies artoj glorie brilas
tra la tuta histori',
Katalunoj, vin rigardas
tuta mond' kun simpati'!

Katalunoj, propra lingvo
estas de popol' trezor':
en ĝi batas ĝia vivo,
ĝia amo, ĝia kor'.
Ne vendaĉu vian lingvon
kontraŭ fremda ja idol'!
Katalunoj, post la lingvo
baldaŭ mortas la popol'!

Katalunoj, el vi multaj
en ekzilo aŭ karcer'
ĝemas, sed aferon vian
ja sanktigas la sufer'!
Vian scyton kaj estonton
tenas Dio en la man',
Katalunoj, sed ne tremu
pro despoto, pro tiran'!

Katalunoj, kuraĝiĝu!
Firme fidu je l'estont':
sur malfortaj fundamentoj
krakas la malnova mond'!
Por vi ankaŭ oriente
sun' leviĝas de liber'!
Katalunoj, ĉiu gento
rajtas lokon sur la ter'!

Katalunoj, patrolando
via ja ne estas ŝtat',
kiu estas nur vivebla
per perfort', persekutad'!
Luktu por libera via
kun persisto, kun obstin'!
Katalunoj, ne forgesu,
ke la mond' rigardas vin!

JAN VAN SCHOOR.

LA FLANDROJ ĈE LA

INTERNACIA BLINDULKONGRESO EN VIENO.

Nia blinda samideano Frans Fiten, gvidanto de la „Algemeen Blindenverbond van Vlaanderen” („Ĝenerala Blindulunuiĝo de Flandrujo”) estis elektita kiel vicprezidanto de la Internacia Blindulkongreso en Vieno.

Pri ĉi tiu kongreso, okazinta de la 13a ĝis la 18a de Julio, ni raportos en nia sekvonta numero. Ni nur nun jam diru, ke la flandraj blinduloj sukcesis aŭdigi dum ĉi tiu kongreso la voĉon de sia popolo: la flandra!

Antverpeno en la XVI^a kaj XVII^a jarcento.

de D-ro J. Denuce, *Urba Arĥivisto.*

Dum tuta la moderna historio, Antverpeno estis la urbo kiu nerezisteble altiris la kuraĝeman kaj scipovan homon. Pli ol unufoje la urbo

estis ja supro, lumilo, en la ĝenerala homa civilizacio, ĉu sur materia, ĉu sur spirita kampo. Ekserĉi la kaŭzojn de tio, kiu historiisto pri Antverpeno ne provis fari tion?

La unua kaŭzo sendube estis la natura, geografia lokiĝo de la urbo mem : ĝi estis kaj ankoraŭ ĉiam estas la loko de kruciĝo de la grandaj, internaciaj vojoj, akvaj kaj teraj, inter la Eŭropaj kulturlandoj kiel Anglujo kaj Germanujo, Francujo kaj la Nordaj regionoj. Bruĝo ankaŭ estis tiel lokiĝanta, kaj ĝia brila historio en la frua mezepoko ankaŭ estis kaŭzita de tio. Sed la naturo (la sabla obstrukciĝo de la Zwin) kaj la neprogesado kun la modernaj postuloj de la internacia cirkulado, faligis la urbon, kiam Antverpeno, en juna forteco, ekkomencis sian malvolvadon. Tragika reveno de la samaj periodoj en la historio, Bruĝo kaj Antverpeno kiel Komerco- kaj scienco- kaj artmetropoloj, ambaŭ la plej harmonia esprimo de tio, kion nia popolo en favoraj cirkonstancoj donis al la mondo!

La granda rolo, kiun Antverpeno ludis en la sociekonomia historio, datumas el la 16a jarcento. La urbo tiam estis la ĉefa komerca centro de Eŭropo. Tiun grandecon ĝi dankis, post sia favora lokiĝo kaj la veturebleco de la *Hont* aŭ okcidenta Skeldo (15a jarcento), al la komerclibero, kiu estis de la komenco la bazo de ĝia politiko. Krom tio aldonu la transmetiĝon de la pezocentro de la transmara komerco, antaŭe en la havenoj de la Meza Maro nun al tiuj de la Atlantika Oceano, sekvo de la transmara malkovroj de Hispanoj kaj Portugaloj. Ameriko kaj Hindujo, venintaj en la mondan trafikon, havis kiel komunan vendejeron Antverpenon, dank' al la potencaj komercist-korporacioj de la Sudanoj, kiuj ekloĝis ĉi tie, kaj milde estis privilegiitaj de la Administrantaro. Lertaj partaj konsentoj al la Anglaj „Merchant Adventurers”, al la Orientanoj kaj la Germanoj tamen reordigis la egalpezon por la multaj aliaj fremdaj elementoj, kiuj sin sentis kvazaŭ hejmaj en Antverpeno. Dum rilate mallonga tempo estis starigita je servo de la komerco, ne sole la belega, unua internacia Borso, sed vastaj konstruaĵoj estis metitaj je l' dispo de la Anglaj komercistoj en la Hoboken- kaj Venusstratoj, la fama Domo de l' Orientanoj, la ankoraŭ ekzistanta sed kaduka Hessen-domo, la riĉa „Domo de Portugalujo” en la Kipdorp, k. t. p. konstruitaj la unua post l' alia aŭ transdonitaj al korporacio. Reĝaj faktoroj traktadis gravajn depruntojn por siaj reĝoj : Schetz kaj Lopez Gallo por la Hispana ; Thomas Gresham por la reĝino de Anglujo.

Antverpeno estis kvazaŭ la vivportanta suno por la tuta lando. Ĝi devigis iumezure Flandrujon kaj Brabanton je pli intensa produktado, je pli granda eksportado. Pli-malpli defalintaj regionoj kiel Okcident-flandrio kaj Henegovio dankis sian rilatan reviviĝon al Antverpeno kiel la Genta industrio restis grava pro la disvolviĝo de la Skeldurbo. La arttapet-industrio de Aŭdenardo, Bruselo kaj Mehleno ne povis ĝis en la 17a jarcento liveri ĉiajn demandatajn produktaĵojn.

Kiel scienca centro radiis el la Skeldurbo la spirita vivo al la deksep Nederlandaj provincoj, de kiuj Antverpeno estis kvazaŭ la ĉefurbo.

Nenie la presarto floradis kiel ĉi tie, de la komenco de la 16a jarcento, por atingi en la dua duono suprojn kun reĝaj presistoj kiel Plantin kaj Silvius. En la unuaj jaroj de l'sekvanta jarcento Abrahamo Verhoeven aperigis la unuan regulan gazeton.

Je l'servo de komerco kaj scienco ankaŭ Ortelius aperigis en Antverpeno sian unuan faman Atlason, de kiu la Flandra eldono „Sceno de la Tero”, presita en 1571, estis la unua geografia kartlibro nacilingva en la tuta mondo.

Sur industria kampo Antverpeno unike aspektis per la fabrikado de silkaj kaj atlasaj ŝtofoj, per siaj postaj vitrofarejoj. Urbo de lukso kaj grandega riĉeco, ne estis mirige ke ĉi tie ekzistis la prilaboro de l'gemoj je granda skalo, ke la diamantindustrio fakte ĉi tie naskiĝis. Diamantoj estis uzataj eĉ por ornamo de la arttapetoj. La granda negoco de tiu eksterordinara komercaĵo necesigis la konstruon de speciala bieno.

La intensaj interrilatoj de tiaj diversaj elementoj el Nordo kaj Sudo, Oriento kaj Okcidento devis antaŭ ĉio favorigi la teĥnikon de komerco kaj marveturo. Ni citu ekzemple la reformon ĉi tie de laambio; laambio, pro la monvaloraĵoj, kiuj alfluegis ĉie tien de ĉiuj landoj, estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de tiuj imponaj fortunoj; ili ja ekestigis tiajn grandajn monspekulaciojn, nome sur la kvar famaj Antverpenaj foiroj.

Je l'unua fojo la komerco estis organizata sur scienca bazo, dank' al nova severa logika librotenado, pri kiu la unua Flandra kompendio de Ympijn, aperis ĉi tie en 1543. La asekuro de komercaĵoj kaj ŝipoj estis tiamaniere organizata, ke la Antverpena kutim-leĝo servis kiel ekzemplo ĉe aliaj popoloj.

La artoj ĉiam floras kie komerco kaj industrio kaj scienco riĉigas kaj spirite edukas la popolon. Por tiu, kiu alproksimiĝis Antverpenon laŭ la riverega flanko, ne estis mirige renkonti en la urbo mem tiujn multajn grandiozajn konstruaĵojn, publikajn kaj privatajn. Du belegaj gravuraĵoj memorigas nin pri la du ekstremaj datoj, inter kiuj la triumfo de Antverpeno troviĝas: la unua estas granda ligna gravuraĵo de la jaro 1515, kun la ankoraŭ nefinita ĉefpreĝejo turo; la alia, pli gracia sed malpli intimatmosfera kupra gravuraĵo de Vrients, de 1610. Sur ambaŭ multege da turoj kaj altaj fasadoj levigas gaje siajn turojn.

La Flandra Renesanca konstrustilo naskis en Antverpeno kaj admirigis siajn plej pompajn memoraĵojn al la postaj jarcentoj: sian novan urbdomon, sian domon de Orientanoj sian Borson kaj Gildomojn. Ni ne parolas ĉi tie pri ĝis S-ta Virgalina turo kaj aliaj preĝejoj, ĉar ili datumas de pli frue, nek pri ĝia posta jezuita preĝejo.

De la 16a jarcento la Antverpena S-ta Lukas gildo estis konsiderata kiel centro, akademio kaj borso samtempe, kie la Nederlanda artvivo

la plej fortike estis centralizita. Ne interrompita vico de grandaj Majstroj, de Quinten Massys ĝis Rubens kaj Quellin, faris de Antverpeno artlaborejon, kiu liveris al la tuta tiam konata mondo. Iu Frans Floris havis cent dudek lernantojn, kiuj pentris milojn da pentraĵoj ekskluzive por la eksporto.

Sur la literatura kampo sin distingis pioniroj kiel Anna Byns, la pasia poetino, Marnix de Aldegonde, kun sia Rabelais-a prozo, Junkro Jan van der Noot, la tipo de la Renesancpoeto.

Tiam ekkomencis la defalo, pro la milito kaj la religiaj bataloj, pro la nesatigebla monsoifo de la registaroj. Ĉar se Antverpeno estis la urbo de la grandaj art-kaj komercmanifestacioj, estis ankaŭ la urbo, kie falis la unuaj viktimoj de la Reformacio en Eŭropo, kie la diversaj filozofiaj kaj politikaj ideoj la plej vigle batalis la unu kontraŭ la alia, la urbo de la Hispana kaj Franca Furioj, de la plej grandaj perfortoj. Oni tamen ne pensu ke post la 16a jarcento la rolo de Antverpeno estis ludita. La nomo de Rubens kaj de lia skolo donas al tio sonan respondon. Sed la libera disvolvado estis malhelpata, materie kaj spirite. Multaj unurangaj elementoj estis elmigrintaj eksterlanden kaj ekkomencis de el Holando, kelkfoje senkompatan batalon kontraŭ sia patra urbo. Por ili estis: „Anversa la ingrata”.

Ĝis post la mezo de la 17a jarcento Antverpeno restis unu el la plej allogaj ĉefaj urboj el Eŭropo. Ne plu estis la bruega renkontejo de la internacia mon- kaj marveturkomerco. Estis enprofundiĝo, kvieteco kvazaŭ post la ŝtormo, antaŭiranta la faktan defalon, kvankam ankoraŭ ĉi tie ekzistis kelkaj el la plej grandaj fortunoj, floris ankoraŭ la industrion kaj formis ankoraŭ aro da artistoj bildon de alta civilizacio.

Ĉi tio estas kelkaj observoj, interesindaj por la turisto, pri kiuj ni precipe atentis, kio Antverpenon distingis de aliaj urboj en la historio, nome la Antverpenon de la 16a jarcento, kiam ĝi vere estis unua faktoro en la estiĝo de la moderna Eŭropo.

El la flandra trad. kun aŭfbla permeso de la aŭtoro :

HECTOR VERMUYTEN.

La lastaj Balotelektadoj en Flandrujo (*)

La 26an de la pasinta monato Majo okazis en Belgujo la balotelektado por la parlamento kaj la senato.

11 Flandraj-nacionalistoj estis elektitaj por la parlamento kaj 3 por la senato.

(*) Pro manko de loko ĉi tiu artikolo ne povis aperi en nia julia numero kaj aperas ĝi kun iom da prokrasto.

WARD HERMANS, la sincera pacifisto kaj publikiginto de la falsaj Bruselaj dokumentoj, estis elektita por la parlamento.

Advokato VAN DIEREN, la defendinto de Borms antaŭ la belga juĝistaro, estis elektita por la senato.

133.568 Flandroj konigis kiel sian unuan postulon : Memregecon por Flandrujo !

En Antverpeno la liberaloj devis cedi sian duan senatan seĝon al la flandraj nacionalistoj, kaj tiamaniere Weyler, la inkvizitoro de la iama liberala urbestro, kiu senpanigis tiom da flandraj familioj, ricevis fine merititan punon.

Malgraŭ la furiozaj atakoj, la ridindaj kalumnioj („markoj de Germanujo kaj rubloj de Rusujo”!) malgraŭ la malaprobo de la belgaj episkopoj, la flandraj nacionalistoj akiris 50.000 voĉojn pli ol dum la lastaj balotelektadoj kaj havas nun, anstataŭ 6, 14 seĝojn en Parlamento kaj senato.

En Flandrujo, Bruselo enkalkulita, la parlamentaj seĝoj estas aljuĝita al : 52 katolikoj, 34 socialistoj, 17 liberaloj, 11 flandraj nacionalistoj, 1 komunisto kaj 1 memstaranto.

Post 10-jara ekzistado la flandra-nacionalista partio akiras do nur 6 seĝojn malpli ol la 80-jaraĝa liberala partio kaj 1/3 de la voĉoj de la socialistoj.

Sed ni ne forgesu, ke estas ankaŭ flandraj nacionalistoj inter katolikoj kaj socialistoj, kiuj submetas sian flandran konvinkon sub sia religiaj aŭ sociaj konvinkoj (nur la liberala partio, „le parti de la France”, ne havas flandremulojn en siaj rangoj). Estas tiel, ke la 9an de Decembro 1928, la enkarcerigita gvidanto de la Flandroj, D-ro Aug. Borms akiris pli ol 80.000 kaj la liberala kandidato 30.000 voĉoj en la distrikto Antverpeno !

La angla revuo „The Nation & Athenceum” skribis i. a. pri la venko de la flandraj nacionalistoj :

„La antaŭeniĝo de la Flandra nacionalismo estas la plej grava okazintaĵo de la balotelektadoj. Ĝi devigos la Belgan Parlamenton priatenti la Flandran movadon. Se dum la venontaj kvar jaroj la Flandraj plendoj ne estos serioze forigitaj, estas certe, ke la movado kreskos kaj tiu antaŭvido devigos la flandremajn anojn de la grandaj Belgaj partioj, precipe ĉe katolikoj kaj socialistoj, batali por forta reformema politiko, ĉar estas ili, kiuj unue suferos, se la Flandra publika opinio, malesperante pri la moderaj metodoj, daŭrigas havigi kreskantan apogon al la ekstremistoj.

La 9an de Junio okazis novaj balotelektadoj por la provincestroj. Estis nova triumfo por la flandraj nacionalistoj : ilia voĉnombro de la 26a de majo ankoraŭ multe pli grandiĝis kaj sekve de tio ili anstataŭ 14, havos nun en la provincestroj **38** elektitojn.

La Belga registaro komdamnis je mortpuno d-ron Borms. Post 10 jaroj ĝi ankoraŭ rifuzis amnestion. De 83.000 Flandroj la kondamnito-je-morto estis voĉdonita el la malliberejo.

La Belga registaro enscenigis skandalon kontraŭ Ward Hermans. La Flandroj sendas Ward Hermans al la parlamento.

Ĉu la Belga registaro fine komprenos kiel forta iĝas la Flandra volo?

Ne, estas malbena kiu pezas sur la Belga registaro, ke ĝi devas persisti en sia idiotismo.

INTER NI.

Flandrema Grupo Esperantista, Antverpeno. - La granda okazintaĵo dum la monato Julio estis nia restado en Oostduinkerke ĉe l'maro okaze de la Esperantista libertempsemajno organizita de la Brita Esperanto Asocio. Ni estis tie pli ol 20-oje, loĝantaj en tendoj sub la libera ĉielo. Ni organizis dum tiu semajno apud nia tendaro feston, pri kiu niaj fremdaj samideanoj unuanime deklaris, ke estis la plej bela vespero, kiun ili ĝuis en Oostduinkerke. Sed mi ne diru pli pri tio : nia amiko Jan promesis skribi siajn impresojn pri tiu esperanto-semajno en la sekvoanta numero de „Flandra Esperantisto”. MART.

* * *

El Sankta-Nikolao. - La aperon de „Flandra Esperantisto” laŭte oni aplaudis kaj multaj geamikoj jam aliĝis. Ankaŭ en nia urbo la esperantistaro malaprobis Belga Ligo-decidojn kaj decidis kunlabori kun la flandremaj amikoj.

Vizito de Hobokena kaj Alostaj grupoj okazis la 21an de Julio ; ankaŭ kelkaj Antverpenaj amikoj venis. Ĉiuj pasigis agrablan tagon kaj esprimis la deziron, ke tiaj renkontiĝoj pli ofte okazu.

NOVAĴO EL KATALONUJO.

El Katalunujo oni skribis al ni :

ANTAŬEN FLANDROJ!

Kun kia ĝojo mi konstatis la aperon de la organo de viaj pensoj kaj sopiroj! Kun kia simpatio mi diras al vi tutkore : antaŭen filoj de subpremita popolo ! La movado de via reviviĝo estas de neniuj popolo rigardata kun pli da intereso kaj simpatio ol de la Kataluna. Ni sekvas ĉiutage la progresojn de via idealo, ni miras kiamaniere vi iras ĉiam antaŭen atingante ĉiujare novajn avantaĝojn por via lingvo, por via propra administrado. Vi eĉ ne povas imagi en via relativa libereco, la malaman sintenadon de Hispanujo rilate la katalunan movadon, persekutante la liberan esprimadon de la kataluna lingvo, malpermesante la

instruon en la lernejoj, sentigante ĉie en ĉiuj aferoj la tiranan manon de siaj direktantoj.

Kaj tamen, la hispanoj neas la ekziston de la problemo de la minoritatoj en la lando! Dum la vizito de Stresemann al Hispanujo pro Ligo de Nacioj, estis atribuitaj al li la manifestoj ke „en Hispanujo ekzistas ankaŭ la problemo, pro vaskoj kaj katalunoj”. Baldaŭ estis severe kontraŭdiritaj tiaj vertoj pro tio ke „en Hispanujo la unueco estas perfekta depost centoj da jaroj”.

Unueco perfekta, kaj oni perfortigas vin paroli hispane en la tribunaloj, ĉe la notarioj, ĉe la skoloj, kie estas severe punitaj la profesoroj de katalunistaj tendencoj, per ekzilado au translokiĝo al aliaj lokoj kiel eble plej izolaj.

La malamo al ĉio kataluntendenca vi povas kompreni per la dekreto malpermesanta la nomon *kataluna* por *Kataluna Esperantista Federacio*.

En sia freneza deziro Hispanigi ĉion, eĉ la nomo kataluna fariĝas suspekta kaj oni volas ekstermi ĝin.

La argumento estas ĉiam la samaj. „La malamo de la aktivistoj por la franca lingvo”, anstataŭ diri „la estimo por la propra idiomo”, estas paroloj kiuj certe konas, transportitaj al sia respektiva popolo, ĉekoj, finnoj, k. t. p.

Antaŭen Flandroj! Dum la katalunoj devas atendi pro minaco de karceri, ekzilo aŭ monpunoj, nia simpatio akompanas vin ĉe via vekiĝo!

Esperanto door Zelfonderricht.

1e LES.

ALFABET. — a, b (bo), c (tso), d (do), e, f (fo), g (go), ho (ho), ĥ (cho), i, j (jo), ĵ (ĵo, als fransche j in Jean), k (ko), l (lo), m (mo), n (no), o, p (po), r (ro), s (so), ŝ (ŝo, als fransche ch in cheval), t (to), u (oe), ŭ (wo), v (vo), z (zo).

De letters ij, q, w, x en y komen niet voor in het Esperanto-alfabet. Alle letters worden uitgesproken en steeds op de zelfde manier.

KLEMTOON. — De klemtoon valt steeds op de voorlaatste lettergreep.

WOORDVORMING. — De woorden worden gevormd door middel van onveranderlijke stammen, uitgangen, voorvoegsels en achtervoegsels en ook door middel van samenstelling.

LEESOFENING. — akuzativo, altaro, ananaso, **Aprilo**, argumento, bagatelo, **Aŭgusto**, beko, biero, **blonda**, cigaro, cipreso, citrono, ĉokolado, danki, demono, diamanto, dika, dorno, drako, ekzameno, entuziasmo, etero, fakturo, fiero, flanelo, fragmento, frako, gaso, gitaro, glaso, grupo, haro, haringo, ĥemio, horloĝo, hostio, hotelo, hufo, in-

sekto, jako, jaluza, juvelo, kanario, karafo, karnavalo, **Kristo**, kristalo, legendo, limonado, magneto, maniero, matraco, meĥaniko, minuto, **modoj**, monstro, najtingalo, nesto, nordo, numero, ovala, palmo, paradizo, parko, paroĥo, pelikano, persono, petrolo, **planto**, proceso, procesio, profeto, provinco, regimento, saŭco, ŝipo, siropo, **strato**, ŝuldo, tabako, talento, teo, testamento, valso, vango, varma, vazo, vespo, vorto, vulkano, zebro, zinko, zorgo.

Al deze woorden zijn voor een Vlaming dadelijk verstaanbaar ; hoeven dus niet vertaald. De beklemtoonde lettergrepen hebben wij onderlijnd.

HET LIDWOORD. — Het bepalend lidwoord is **la** voor de drie geslachten, enkelvoud en meervoud.

Het onbepalend lidwoord **een**, 'n bestaat niet.

Het NAAMWOORD gaat steeds uit op **o** ;

het HOEDANIGHEIDSWOORD op **a** ;

het BIJWOORD op **e** ;

en de NOEMVORM DER WERKWOORDEN op **i**.

Het MEERVOUD wordt gevormd door **j** : la bona patro (de goede vader) ; la bonaj patroj.

Het VROUWELIJK GESLACHT wordt aangeduid door middel van het achtervoegsel **in-** : la bonaj patrinoj (de goede moeders).

De ONVOLMAAKT TEGENWOORDIGE TIJD wordt gevormd door **-as** ; deze uitgang is dezelfde voor alle personen en getallen : mi skribas (ik schrijf) ; ili skribas (zij schrijven).

Vertaal. — De vader en de moeder. Zuster en broeder. Het huis van den oom. De rappe kat. De jongen schrijft snel. Gij en ik zijn goede vrienden. Op de tafel ligt een boek en een potlood. Het boek is bruin en het potlood rood. Antwerpen is een stad met breede straten en schoone standbeelden. De vrienden van mijn vrienden zijn mijn vrienden. In het dorp staan hooge boomen.

WOORDENLIJST. — en = kaj ; broeder = frato ; huis = domo ; van = de ; oom = onklo ; rap = rapida ; kat = kato ; jongen = knabo ; schrijven = skribi ; ik = mi ; gij = vi ; zijn = esti ; goed = bona ; vriend = amiko ; op = sur ; tafel = tablo ; liggen = kuŝi ; potlood = krajono ; boek = libro ; bruin = bruna ; rood = ruĝa ; stad = urbo ; met = kun ; breed = larĝa ; straat = strato ; schoon = bela ; standbeeld = monumento ; mijn = mia ; in = en ; dorp = vilaĝo ; staan = stari ; hoog = alta ; boom = arbo.

Lees en vertaal. — La familio konsistas el la patro, la patrino kaj la infanoj. La patro laboras ĉe la haveno kaj la patrino laboras en la

hejmo. La infanoj iras al la lernejo kaj lernas diligente. Vespere la infanoj iras frue al la lito dum la patro legas, fumas aŭ babilas kun la edzino.

WOORDENLIJST. — familia = huisgezin ; konsisti = bestaan ; el = uit ; infano = kind ; labori = arbeiden ; ĉe = aan ; haveno = haven ; hejmo = thuis ; iri = gaan ; al = naar ; lernejo = school ; lerni = leeren ; diligente = vlijtig ; vespere = 's avonds ; frue = vroeg ; lito = bed ; dum = terwyl ; legi = lezen ; fumi = rooken ; babili = praten ; edzo = echtgenoot.

De vertalingen zullen in het volgende nummer verschijnen, zoodat de studeerenden vergelijken kunnen.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”).

Poŝtkarto kun portreto de L. L. Zamenhof. - La bildo laŭ desegno (deposita) de H. Pieyns el Aalst, estas - kvankam kubista - la plej bona portreto de la Majstro, kiun ni ĝis nun vidis. Oni nepre uzu tiun poŝtkarton por korespondado aŭ ornamado de studĉambro. Ĝi estas havebla ĉe la eldonintoj R. Dekegel kaj P. P. Collin (D. & V. D. de U. E. A.), Denderstraat, 58, Aalst (Belgujo). Prezo : 1 belgo po 10 ekzempleroj.

* * *

Plena Jarraporto de Utrechta Esperantista Rondo pri la jaro 1928a, suplemento al „Utrechta Esperantisto”. Adreso : Domplein, 25, Utrecht.

* * *

Ricevitaj Revuoj.

Sennaciulo, n° 248, enhavas i. a. tre interesan artikolon pri la formiĝo de tutmondaj trustoj.

Arbeiter-Esperantist, Juli 1929, tre bele ilustrita.

Dordrechta Esperantisto, Junio, Julio 1929.

Utrechta Esperantisto, Majo, Junio kaj Julio 1929.

Schola et Vita, Aprile-Majo 1929.

Breiz Atao, n° 58.

Hinda Esperantisto.

Subteno por nia revuo.

J. Van Braekel, 100.- fr. ; *Jos. Janssens*, 5.- fr. ; *Jan*, 20.- fr. ; *X...*, 5.- fr. ; *Julien Malbrant*, 20.- fr. ; *John Théry*, ĉiumonate, 10.- fr. ; *Mart*, 20.- fr. ; *Kunveno F. G. E.* 3/7, 8.- fr. ; *Jef Van Campenhout*, 20.- fr. ; *R. Maes*, 5.- fr. ; *Deckers*, 10.- fr. ; *X...* 2.- fr. ; **entute ; 225.00 fr.**

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

LETTERKESTO.

— La redakcio dankas ĉiujn, kiuj skribe eldiris sian simpatian. Mankas la tempo por respondi alimaniere ol per ĉi tiu sciigo. Al la simpatiantoj el Sankta Nikolao, Kortrijk, Aalst, Mehleno kaj aliaj lokoj ni diras : laboru, propagandu, organizigu vin, pretigu vin por kunlaborado !

— Al la kelkaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj jam abonis nian revuon, dankon pro la fido !

„FLANDRA ESPERANTISTO” DEZIRAS INTERŜANĜI
KUN ALIAJ ESPERANTAJ REVUOJ,
PACIFISTAJ KAJ ORGANOJ DE SUBPREMITAJ POPOLOJ.

Pro manko de loko kelkaj manuskriptoj ne povis esti presataj. Niaj kunlaborantoj paciencu.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spatenbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet Goede bediening.

Kunvenejo de l'Esperantistoj.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-

208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.
